XIV ORDINARA TEMPO – 4an de julio 2010

VIA PACO MALSUPRENIROS SUR LIN

– Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 10,1-12,17,20

En tiu tempo, la Sinjoro elektis sepdek du aliajn, kaj ilin forsendis duope antaŭ si en ĉiun urbon kaj lokon, kien li estis venonta.

Li diradis al ili: «La rikolto estas granda, sed estas malmultaj la laborantoj! Petu do la sinjoron de la rikolto, por ke li sendu laborantojn en sian rikolton! Iru: jen, mi sendas vin kiel ŝafidojn meze de lupoj, kunportu nek monujon, nek saketon, nek sandalojn kaj ne haltu saluti iun ajn laŭlonge de la vojo.

En kiun ajn domon vi eniros, unue diru: "Paco al ĉi tiu domo!". Se tie estos filo de paco, via paco malsupreniros sur lin, se ne, ĝi revenos al vi. Vi restu en tiu domo, manĝante kaj trinkante kion ili havas, ĉar laboranto rajtas je sia rekompenco. Ne transiru de unu domo al alia.

Kiam vi eniros en iun urbon kaj oni vin akceptos, manĝu tion kion oni oferas al vi, kuracu la malsanulojn kiuj estas tie kaj diru al ili: "Proksimas al vi la regno de Dio". Sed kiam vi eniros en iun urbon kaj oni ne vin akceptos, eliru sur ĝiajn placojn kaj diru: "Eĉ la polvon de via urbo, kiu gluiĝis al niaj piedoj, ni ĝin devigas kontraŭ vin, sciu tamen ke la regno de Dio proksimas". Mi diras al vi ke, en tiu tago, Sodomo estos traktata malpli severe ol tiu urbo».

La sepdek du revenis ĝojoplenaj, dirante: «Sinjoro, eĉ la demonoj submetiĝas al ni en via nomo». Li diris al ili: «Mi vidis Satanon fali de la ĉielo kiel fulmo. Jen, mi donis al vi la povon paŝi sur serpentoj kaj skorpioj kaj sur la tuta potenco de la malamiko: nenio povos vin difekti. Tamen ne ĝoju pri tio, ke la demonoj submetiĝas al vi, prefere ĝoju ĉar viaj nomoj estas skribitaj en la ĉieloj».

La peco kiun ni nun komentas estas nure de Luko, la ununura evangeliisto kiu ĝin havas. “Post tiuj okazaĵoj”, sed kiuj estas tiuj okazaĵoj? Jesuo, konsiderante la malsukceson de la Dekdu, kiuj, senditaj liberigi la personojn, ne nur ne sukcesas ilin liberigi, sed eĉ volas tion malpermesi, vokis la Samarianojn al sia sekvantaro.

Jen, post tiuj okazaĵoj, “la Sinjoro”, voknomo per kiu en la komunumo oni sin adresas al Jesuo resurektinta, “elektis Sepdek du aliajn”. Kial Sepdek du? Ĉar, dum Dekdu estas la nombro kiu koncernas la tribojn de Izraelo, do la mesaĝo estas por Izraelo, Sepdek du, laŭ iu kalkulo kiu troviĝas en la libro de Genezo, ĉapitro X, estas la paganaj nacioj.

Do temas pri universala misio tiu por kiu Jesuo sendas la Samarianojn, nome tiuj kiuj ne devenas de Izraelo. “Li ilin forsendis duope”, por ke ili estu komunumo, sed precipe ĉar la nombro du estis tiu nepre necesa por esti atestantoj, “en ĉiun urbon kaj lokon kien li estis venonta. Kaj diradis al ili *«*La rikolto estas granda*»*, nome la respondo al la bona novaĵo estos tre abunda. Jesuo certigas nin pri tio.

Kiam tio kion oni proklamas estas la bona novaĵo, la rezulto estos eksterordinara, “*«*Tamen estas malmultaj la laborantoj*»*”. Tiu peto de Jesuo: “*«*Petu la Sinjoron de la rikolto por ke li sendu laborantojn en sian rikolton*»*”, ne koncernas nur la kategoriojn, kiel foje oni pensas – de pastroj, fratuloj kaj monakinoj, sed estas invito adresata al ĉiuj, por ke ĉiu konsciu pri la urĝeco de tiu misio.

Poste Jesuo donas indikojn tre klarajn: oni ne povas dementi per sia konduto la mesaĝon kiun oni iras anonci. Pro tio li diras: “*«*Mi vin sendas kiel ŝafidojn meze de la lupoj*»*”, la opozicio de la socio, kiu vidos sin minacata en siaj bazoj de la havo, de la supreniro, de la estrado, estos terura.

Jesuo diras: “iru sendefendaj, ĉar la Sinjoro, la Spirito estos via defendo”. Kaj krome: *«*kunportu nek monujon, nek saketon, nek sandalojn*»*, tio estas ne pensu al via vivtenado, ne zorgu pri tio kion vi manĝos aŭ trinkos, ĉar la Sinjoro tion prizorgos; do iri en maniero kiu ne dementu la fidon kiun oni anoncadas.

“Ne halti por saluti” etas ĉar la saluto en oriento estis tipe senfina. Poste la Sinjoro donas indikojn tre klarajn: “*«*En kiu ajn domon vi eniras*»*”, do en kiu ajn hejmon oni eniras, “*«*Unue diru Paco al ĉi tiu domo*»*”, tio estas la bondeziro. Paco signifas inviton al plena feliĉo.

“*«*Se tie estos iu filo de paco*»*”, nome se tie estos iu kiu enhavas tiun deziron al vivopleno, “*«*la paco malsupreniros sur lin*»”*. Poste Jesuo atentigas: “*«*Restu en tiu domo manĝante kaj trinkante tion kion ili havas*»*”. Kial tiu detalo? Ĉar oni sciis ke en la hebrea kaj ankaŭ en la samariana mondoj, oni atentis manĝi nenion, tuŝi nenion kiu estu klasata kiel ‘malpura’, pro tio oni ne iradis en la domojn de la paganoj, kiuj estis malpuraj.

Jesuo diras: “Ne havu tiujn skrupulojn”. Jesuo jam diris aliloke ke ne estas tio kiu eniras, sed tio kiu eliras kiu igas la homon malpura. “*«*Kaj laboranto rajtas je sia rekompenco»”, do “iru sen maltrankviliĝi ĉar ĝi estos donate”. “*«*Kaj ne transiru de unu domo al alia*»*”. En la Agoj de la Apostoloj troviĝas Petro kiu diras ke “ne licas al Judo unuiĝi aŭ renkontiĝi kun personoj alirasaj”. Jesuo diras: “Ne havu tiujn skrupulojn,

tiujn problemojn. Do, kiam vi eniras en iun domon, ne estu nekontentiĝemaj, troelektemaj, pro religiaj kialoj", "«Sed tie restu»".

Kaj refoje Jesuo insistas, tiu insistado videble kaŭzadis reziston flanke de tiuj senditoj. "«Manĝu kion oni oferos al vi»", do "ne estu troelektemaj, tio estas pura, tio estas malpura, tio eblas kaj tio ne eblas", kaj poste, jen: "«Kuracu»" ne 'sanigu', kiel tradukas la Itala Episkopara Konferenco. "Kuracu la malsanulojn kiuj tie troviĝas, kaj diru al ili" – tio estas al la malsanuloj – "«Proksimas al vi la Dia regno»".

La regno de Dio prizorgas la bezonojn kaj la malsanojn de la homaro; la regno de Dio venis por mildigi la malsanojn kaj la suferojn kiuj estas en la homoj kaj tiujn oni devas kuraci. Tio signifas ke oni klopodas mildigi ilian suferon. Se ili ne akceptas vin, diras Jesuo, ne insistu, evidente la medio ne pretas, do "ne perdu tempon".

Poste tio estas forigita en la liturgia teksto, Jesuo diras ke la respondo de la paganoj estos pli granda ol tiu de Izraelo. Kaj li listigas tri paganajn urbojn kontraŭmetitajn al tri Izraelaj urboj, kiuj estas Kapernaumo, Korazin kaj Betsajdo, kiuj lin ne akceptis. Do la rezulto estas ke "la Sepdek du revenis ĝojoplenaj dirante: «Sinjoro, eĉ demonoj submetiĝas al ni en via nomo»", tio estas dank' al la mesaĝo de Jesuo la homoj estas liberigitaj de tiuj falsaj ideologioj kiuj igis ilin rezistemaj, malamikaj al tiu bona novaĵo.

Sed, kompreneble, nur tiu kiu estas libera povas liberigi, jen kial la Dekdu ne sukcesis. Kaj jen, tre grava, la aserto de Jesuo: "«Mi vidis Satanon fali de la ĉielo kiel fulmo»". En la tiuepoka konceptado Satano estis en la ĉieloj, li estis funkciulo de la dia kortego, li estis ministro de Dio. Sufiĉas legi la libron de Ijob, kie Dio ricevas siajn filojn kaj inter tiuj estas ankaŭ Satano. Li estis la ĉefinspektisto de Dio, tiu kiu prizorgis liajn interesojn kaj lia tasko estis kontroli la homojn, kaj poste ilin akuzi antaŭ Dio por poste aljuĝi al ili la punon por iliaj pekoj.

Nu, per la anonco de la Sepdek du, la Bona Novaĵo sukcesis. Kaj kiu estas la Bona Novaĵo? La Bona Novaĵo estas ke Dio ne estas bona, sed li estas ekzkluzive bona; la Dio de Jesuo ne estas la Dio de la religio kiu premias la bonulojn kaj punas la malbonulojn, sed al ĉiuj li transdonas amon. Do la rolo de Satano finiĝas; estas senutile ke li akuzu ĉe Dio, ĉar Li al ĉiuj, sendepende de ilia konduto, transdonas sian amon.

Jam Jesuo en tiu evangelio estis dirinta: "Ĉar la Patro estas bonkora kun la sendankemaj kaj la malbonuloj". Tiam Satano estas forpelita de la ĉielo, lia rolo finiĝis. Kaj en Apokalipso gravas la difino kiun oni donis pri tiu epizodo. "Estis subenfaligita la akuzanto de niaj fratoj, tiu kiu ilin akuzadis antaŭ nia Dio tagnokte".

Poste la fina trankviligo: "Nenio povos vin difekti", do la malamikaj fortoj ne povos malbonfari al vi, ĉar la lumo estas pli forta ol la mallumo, kaj la vivo estas pli forta ol la morto. Kaj kiel lastaĵo Jesuo diras: "Ĝoju, ne tiom pro viaj sukcesoj", "«ĝoju prefere ĉar viaj nomoj estas skribitaj en la ĉieloj»", nome la sperto sin senti amataj de Dio.

Do, de la du disĉiploj kiuj petadis fajron de la ĉielo kiu detruu la Samarianojn, estas la Samarianoj kiuj sukcesas faligi de la ĉielo Satanon, la malamiko de la homaro.